


rezulto de la alvoko farita al la gelernantoj de la antaŭaj kursoj okazintaj en la urbo por ke ili partoprenu en ĉi tiu lasta. Fakte preskaŭ ĉiuj ge-esperantistoj de tiu epoko por ĉiam forlasis la esperantistan movadon aŭ almenaŭ la esperantistan aktivadon. Ia-maniere la gijona E-grupo estis alveninte tiam al la fino de ciklo kiu komenciĝis post la **16a Hispana Esperantista Kongreso,** en la jaro 1955. Ni vidos per la sekvaj ĉapitroj de ĉi tiu historia raporto ke poste venis por la esperantismo de nia urbo nova epoko kun novaj protagonistoj, eĉ se el ĉi tiu antaŭa periodo persistis la ĉeesto kaj la aktivado de personoj kiuj portis la torĉon de la esperantismo kaj transpasigis ĝin de iu generacio al alia; ĉi tiu fenomeno estas normala okazaĵo en la esperantista movado... kaj en aliaj. Fine de la prikomentata akt-libra teksto, oni deklaras ke la estraro de la Grupo dankis al Santiago Mulas pro la entuziasmo kun kiu li entreprenas la instruadon de Esperanto.



Alfredo Villa Villa

En ĉi tiu jaro, 1969, dum la samideanoj de Mieres organizadis la kongreson de la sekvonta jaro, kelkaj esperantistoj de Gijón komencis fari planon por ties partopreno en tiu **30a Hispana Kongreso de Esperanto** kiun oni fiksis, fine, por la monato julio de 1970 en Mieres. Sed estis iu grava esperantisto de nia urbo kiu ne povis ĉeesti tiu kongreson: la 7an de aprilo de tiu jaro forpasis Alfredo Villa Villa. Tiele finiĝis vivo de homo kiu dediĉis al Esperanto preskaŭ sesdek jarojn de sia ekzistado. Li esperantiĝis en la jaro 1910, kaj ekde la jaro 1911, kiam estis fondita la esperantista grupo de la Laborista Ateneo de Gijón, li apartenis al ĝi kaj poste gvidis ĝin. Li estis ankaŭ redaktoro de la revuo **Diagonalo** de tiu Esperanta grupo kaj ofte kunlaboris en **Boletin** de **HEF** kaj aliaj gazetoj esperantistaj. En la jaro 1955 li estis la ĉefa zorganto en la organizado de landa Kongreso de Esperanto en Gijón. Per lia morto malaperis unu el la plej elstaraj figuroj de la esperantismo en nia urbo. Lia forpaso kaj la baldaŭe posta retiriĝo de Alberto Menéndez estis aliaj signoj aŭ lim-ŝtonoj de la menciita epoko-ŝanĝo por la gijona organizita esperantismo.